



SALUTON!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

16 Junio 2005

№ 9

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our
Treasurer, Charles Gunn,
828 S. Ada, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Saluton, estimata leganto! Fulmrapide forflugis ankoraŭ unu monato de nia vanta vivo kaj junia varmego intencas ekregi sur la okcidenta bordo de la lago Miĉigano. Sed malgraŭ ĉio mi devas denove sidi ĉe mia kompatinda komputilo kaj ion verki por vi, mi ja promesis. Laŭ plano ĉi numero devas esti ege informriĉa. Do, ek!

Nia nova leganto kaj heroo de la lasta numero de *Saluton!* s-ro Mramba Simba el Tanzanio kore dankas al s-inoj (kaj niaj samklubaninoj) Tina kaj Gertrude pro vizito, donacoj, bonkoreco, inspiroj, konsiloj kaj revas pri sekvantaj revidoj, sincere salutante la tutan kolektivon de nia societo. Ni reciprokas, ĉu vi aŭdas, Simba?

LASTE OKAZIS

Maja kunsido de la E-societo dank'al Marko Ŝafrot estis dediĉita al la fortoj de malbono. Vi eble memoras pri nia anonco, ke Marko gvidos nin tra la mondo de Mefisto. Kvankam nia kunsido okazis ne dum kutima kvara merkredo kaj homoj ne multis, pro tio ili devas bedaŭri, ĉar Marko sperte, interese en sufiĉe bona E-o rakontis pri la malkvietaj tempoj de 20-30 jaroj en Germanio. Fakte al tio estas dediĉita la filmo *Mefisto*, ĉirkaŭ kiu turniĝis nia vica kluba renkonto. Iam germano J. V. Goete verkis faman drampoemon *Faŭsto*-n pri la samnoma konvinkita idealisto-filozofo kaj Diablo Mefisto, vivkredo de kiu estas ĉi-momenta senza mem-kontento. En la poemo kontraŭstaras dio kaj diablo, bono kaj malbono, nigro kaj blanko. Tiu temo poste uzis en sia libro *Mefisto* Klaus Mann (1936), kiun siavice filmigis hungaroj en 1981 kaj eĉ lerte Esperantigis. Filmo gajnis iun premion dum Kanna kinofestivalo (1981) kaj sekvantajre (1982) gajnis Oskaron kiel la plej bona eksterlanda filmo. Kaj M. Ŝafrot uzinte riĉan materialon donacis al ni du horojn da plezuro. Dankon! Por forestintoj mi proponas esperantigitan fragmenton el *Faŭsto*:

Faŭsto:

Ho, jam mi pri filozofi',
Jurisprudenc' kaj medicin',
Bedaŭre eĉ teologi'
Penege okupadis min.
Jen mi nun staras, malsaĝul'!
Kaj sciokresko estas nul';
Magistro mi nomiĝas, eĉ doktor',
Kaj jam dek jarojn kun fervor',
Malsupren, supren, kurbe, rekte
Disĉiplojn trompas mi perfekte -
Kaj vidas, ke ne eblas scio!
La koron preskaŭ rompas tio.
Ja mi pli saĝas ol tiuj filistroj,
Doktoroj, skribistoj, pastraĉoj, magistroj;
Skrupuloj aŭ duboj ne min deprimas,

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –
Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;
toll free: 1-800-ESPERANTO
(1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association
<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/esp/viva/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format
<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

22an de Junio – nin vizitos famaj e-istoj kaj bienposedantoj ges-oj **Grattapaglia** el brazila fazendo “Bona Espero”

27an de Julio – okazos distanca kunsido en Vilno, Litovio. La loko jam estis rezervita en la Kogresejo!

24an de Augusto – membroj ne la societo raportos pri sia freŝa sperto en **Esperantio-05**

Ĉu ankaŭ ĉi jare ni festos **Ago-Tagon**, kiu koincidas kun la Kolumba tago, kaj pasigos du oktobrajn tagojn en E-etoso? (reeĥu)

Mi la inferon, diablojn ne timas -
Tamen, per perdo de ĝojo mi pagas,
Scii esencon mi ne imagas,
Mi ne imagas povi instrui,
Al plibonigo de la hom' kontribui.
Nek monon krome, nek honoron
Mi havas, kaj ne mondan gloron;
Eĉ hund' ne kontentus pri tio!
Do mi min donis al magio.



Interesan informon sendis al *Saluton!* Ernesto: per “Google News” li eksciis pri la juna Ŝikaga pentristo, kiu titologas siajn verkojn Esperante. Lia nomo estas Scott Anderson, li estas magistro pri arto, antaŭ nelonge li ekspoziciis siajn kreaĵojn en Kalifornio. En la Interreto oni povas trovi abundon de informo pri tiu pentristo, liajn fantastikajn bildojn, intervuojn, kie, interalie, li diris, ke “Esperanto estis universala lingvo...” (kaj nun ne estas?) Se iu volas kontribui pri tiu artisto, ne hezitu skribi al la redaktoro Araneo (adreso malsupre).

* * *

Vintre ni aperigis artikoleton pri fama skota E-poeto kaj tradukisto, akademiano Bill Auld, ke li donacis sian pli ol 4000-voluman E-libro-kolekton al la Nacia Biblioteko en Edinburgo (Skotlando). Kaj jen – simila informo: angla E-poeto Kris Long transdonis sian grandan (kelkcentan) libraron al La Brita Biblioteko en Londono. Imitinda gesto, ĉu?

* * *




Hodiaŭ, la 15an de Junio, estas la lasta tago, kiam oni povas aliĝi al la UK en Vilno, Litovio pere de UEA kaj via nomo povus aperi en la Kongresa libro. De morgaŭ dezirantoj partopreni litovan UK-on povas aliĝi nur surloke. Entute jam aliĝis 2059 gesamideanoj el 60 landoj, inter ili – tri membroj de nia societo. Nia sekretario Viktor Pajuk provis kontakti kun esperantistoj el ĝemelurboj de Ŝikago (entute 24 urboj en 23 landoj). Estis senditaj mesaĝoj al e-istoj de 16 urboj, reeĥis 9, el kiuj nur 4 estos reprezentotaj en Vilno, pretaj preparoli ĉe ronda tablo perspektivoj de nia estonta kunlaboro.

* * *

Enkadre de aŭ post la UK en Vilno okazos ankoraŭ kelkaj interesaj E-aranĝoj, nome:
– apud Vilno 6-13 jaraj infanoj kolektiĝos por la Internacia Kongreseto;
– tuj post la UK, la 30.07-05.08, okazos konferenco de ILEI (E-instruistoj);
– samtempe kun instruista konferenco estos aranĝata Internacia kongreso de blindaj E-istoj.

Pri ĉuj menciitaj eventoj nepre informos vin sur la paĝoj de *Saluton!* ĝia redaktoro kaj via obeema servanto

 araneoesp @ yahoo.co.uk